BEL
Cx.Postal,3625
BRASÍLIA-DF
70084-970

GISTO, FEB-07.

G.O.Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000, Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo

eeee

SUFIKSO "ut"

Por niaj Gisto-rondanoj kaj chefe por nia diligenta Gisto-leganto, Ennio (Torres), Gisto registras la difinon proponatan de PIV: sufikso de kondicionala pasiva participo, signifanta "kiun oni -us" kaj ekzempligas per "la ofend-oj pardonu!" Do, laù chi ekzemplo: ofendutoj = kiuj estis/as/os ofenditaj, tiuj pardonu (min)!.

URGXI – Chu la vorto estas transitiva aù ne-transitiva? – Laù PIV: (tr) Vigle plirapidigi, vive akceli: *ne chesu ilin –i kaj bone komprenigi...*

CHEPLAGXA FULMOKURSO

Chirilate mi aùdis nenion far GEA, la somero sinkas en malvarmaj tagoj kaj nia kara lingvo perdis amason da aùskultantoj malhelpe al UEA-propono, ke oni provu entiri ne-esperantistojn en nian medion.

LIBROFOIRO/2006

Tial ke GEA-anoj bone rilatas al la gaúcha spiritismaj rondoj, mi pensas ke estus ne malfacile arangxi etan angulon che unu el iliaj standoj sed... neniu pravigis la maleston de E-libro dum la Foiro.—Z.diradis ke, pacienco estu ingredienco necesa. La jaro 2007 baldaù proponos novan eblecon por provi nian sxancon montri ke GEA ekzistas.

BEL

Oni kontentis, kiam BEL-estraro preskaù fanfarone distrumpetis ke nova erao favoros la brazilan E-movadon, helpe de grava subtenema organizajxo. Mi, unuopulo, ne sentis prosperigan sxangxon tial mi lastatempe ne plu anigxis. La nuna estraro komencigxis iom nebuleca kaj daùras. Multaj gesamideanoj ne ricevis invitilon, por vochdoni. Okazis diskurso ke nur diplomitaj profesoroj devas (rajtas) instrui Esperanton. La revuo Brazila Esperantisto versxajne vanuis. Oni ne aùdas pri gxi en la gaúcha E-movado.

Ie mi legis:

MALKONTENTO.

Dekjara lernejano komentas antaù sia patro, ke kolegoj primokas lin pro lia malbela aspekto kaj ke pro tio li ankoraù ne sukcesis havigi al si amatinon. La patro konsolas lin, ke kiam li plenkreskis li estos fortikulo, bela fraùlo, ke Dio ne povas kontentigi chiun kreitajxon, ktp. Por fini, la patro diras al li: se Dio rajtigus vin dum unu minuto peti kaj ricevi kiun ajn vi volas, kion vi farus, mia filo? - Min plenkovri per hararo. La patro sxokite miras kaj petas, sed filo, diru al mi, kial? La junulo pravigas sian peton: mia onklino posedas grandan apartemanton, luksan aùton, turistas chiujare tra Eùropo, sinjorino Fortuna tre favoras sxin sed sxi havas nur etan hartufon sur la pubo.

SPRITA VENDISTO

Lerta vendisto serchis laborpostenon che fabriko de fajrestingiloj. Dum la intervjuo la mastro diris al li, provu vendi ion al mi.
- Jes. Kara kliento, mi vendas fairoestinguilojn de la plej fama fabriko en la mondo. Niaj produktoj ricevas centjaran garantion de perfekta funkciado.
- Kial mi volas centjaran garantion, se tiam mi jam mortis?
- Certagrade vi pravas, sinjoro sed oni konsideru la okazon ke vi hazarde eniris la Inferon..

CRI ANONCIS:

La tridekan de januaro/07 CHO-RO-I anoncis, ke Chinio bezonas bonajn E-parolantojn. Versxajne por instrua eksperimento. Mi kaptis la mesagxeron en la fino. Interesatoj bv kontaktigxi pere de la INTERNET, www.cri.com.cn aù pere de alia adreso: espradio@cri.com.cn
- Jen bela oportuno por diligentuloj ricevi meritan premion. //PEKO//

Se lertaj parolantoj negas parol-oportunon al samideanoj, tio estas peko. Ne peku!